



## Venontaj eventoj

👉 **Hodiaŭ** 👈

- ★ **2:00 ptm:** Promeno al la glisilejo apud UCSD. Renkontiĝu antaŭ la loĝejoj.
- ★ **7:30 ptm:** Katalin prezentos informon pri la oficialaj ekzamenoj (KER) por prui lingvoscion.

### Merkredo

- ★ **2:00 ptm:** Fulm-leciono pri ĵonglado
- ★ **7:30 ptm:** Japanaj kantoj

### Ĵaŭdo

- ★ **2:00 ptm:** Steĉjo kaj Meja anoncas konkurson pri trezorsercado
- ★ **7:30 ptm:** Preparsesio por la KER-ekzamenoj

### Vendredo

- ★ **1:30 ptm:** Ekskurso: akvario Birch
- ★ **7:30 ptm:** Tabul-ludoj

### Sabato

- ★ **atm:** Ekskurso: golfeto La Jolla Cove

### Dimanĉo

- ★ **atm:** Ekskurso: plaĝo Black's Beach
- ? **ptm:** Ekskurso: fajraĵoj en La Jolla

### La NASKa Fasko

**Redaktejo:** Asante n-ro 116  
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko aperas lunde – vendrede dum la kursaro. Kutime ĝi aperas tagmeze. Se vi ne ricevas ĝin post la matenaj klasoj aŭ en la manĝejoj, prenu ekzemplon el la skatolo kiu troviĝas sur la fenestro de la redaktejo.

Ni avide atendas viajn artikolojn, fotojn, desegnaĵojn, bildstriojn, poemojn, viajn am-leterojn... preskaŭ ion ajn! Memoru, la Fasko estas taggazeto **por vi kaj pri vi:** viaj kontribuoj igas ĝin interesa. Do nepre kontribuu!

Se vi ne sentas vin komforta pri verkado, ne timu; ni volonte helpas vin korekti kaj poluri. Serĉu unu el niaj lingvo-helpantoj; sur siaj nomŝildoj ili portas specialajn glumarkojn kun rideto (☺) – kaj ili ridetante helpas vin korekti, poluri, kaj plibonigi vian verkon. Kiam la verko pretas, sendu ĝin per retpoŝto al la adreso supre, aŭ simple portu ĝin piede al la redaktejo.

## Marbordo, klifoj, glisiloj, kaj (espereble) vetero suna



Ĉu vi sopiras al la maro? Ĝuste okcidente de niaj loĝejoj troviĝas belega marbordo, kie ĉiutage ekflugas glisiloj de sur la krutaj klifoj, blovas freŝa mara vento, kaj oni povas vidi kelkajn kilometrojn da puregaj plaĝoj. Serĉu Hoss-on je la 2-a ptm antaŭ la loĝejoj; post 15 minutoj da piedmarŝado, ni atingos la glisilejon. Poste, se oni volos (kaj se la suno finfine brilos!) ni malsupreniros laŭ longa ŝtuparo al la plaĝo *Black's Beach*.

## Nepre ekzameniĝu!

Ĉu ankaŭ vi deziras prui per oficiala ŝtata diplomo vian lingvoscion pri Esperanto?

Ĉu vi scias ke en Hungarujo jare plurmil homoj ekzameniĝas pri Esperanto kaj uzas la akiritan diplomon por havi avantaĝojn en siaj studoj kaj laboro?

Ĉu entute vi scias kiunivele vi konas nian lingvon?

UEA kunlabore kun la hungara ekzamencentro, aneksita al la prestiĝa budapeŝta Universitato Eötvös Loránd funkciigas novan ekzamensistemon, laŭ la Komuna Eŭropa Referencakadro (KER) de la Konsilio de Eŭropo.

La novtipaj Esperanto-ekzamenoj nun estas ellaboritaj en niveloj **B1 (komencintoj)**, **B2 (mezniveluloj)** kaj **C1 (progresantoj)**.

Mem la atestilo estas impona, oficiala dokumento, verkita en 4 lingvoj (en Esperanto, angla, germana kaj franca).

La akreditigo kaj funkciigo de la sistemo okazas kunlabore kun la Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK <<http://itk.hu>>) en Budapeŝto, kie Esperanto troviĝas inter la oficiale rekonataj fremdaj lingvoj.

Nia hungara partnero ITK estas plenrajta membro de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo ALTE <<http://alte.org>>.

La ekzamenon eblas trapasi ekde januaro 2009 kaj jam havas sian diplomon 140 personoj, inter ili nur tri usonanoj.

Jen unika eblo por NASK-anoj plibonigi la statistikon de Usono kaj esti

inter la unuaj kiuj akiras la prestiĝan diplomon.

La 5-an de julio okazos ĉi tie la unua ekstereŭropa sesio. Por informoj turnu vin al Katalin, kiu okazigos preparsesion ĵaŭdon vespere.

## Salutmesaĝo de profesoro Orlando RAOLA

*Li instruas ĉi-semajne en la altnivela kurso.*



Saluton, karaj geamikoj!

Jen mi, Orlando E. RAOLA. Mi ege ĝojas pro la fakto ke mi finfine alvenis al San Diego kaj renkontas vin ĉiujn. Mi antaŭvidas pasigi mirindajn tagojn kune

kun vi.

La ĉefa temo de mia kontribuo al la kursaro estas Kubo, kie ĉi-jare okazos la 95-a Universala Kongreso de Esperanto. Mi ĵus pretigis retan paĝaron kun legaĵoj kaj aŭdaĵoj por vi. Bonvolu, se vi planas partopreni mian kurseron, sendi noton al mia retadreso, <[oraola@gmail.com](mailto:oraola@gmail.com)>, kaj mi responde sendos al vi la inviton viziti la retejon (bedaŭrinde, pro kopirajtaj aferoj mi ne povas malfermi la retejon al la tuta mondo!). Ĝis revido en nia klaso!

# Niaj ĉi-jaraj NASK-anoj

De maldekstre: Jody HURD, Shirley AMRANI, Tor KINLOK, Kristy LOMMEN, Dori VALLON-WHEELER, Ĝeremio ALDRICH, Gary ANDERSON, Chris WINGROVE, Vido GILLET, Meja JUNA, Harold GOODMAN, Grant GOODALL, Ken HIROSHIGE, Melissa DEMERS, Liĉjo MILLER, Steĉjo CYBULSKI, Yoŝiki KOMORI, Paŭleto BRENER, Aparecida de Souza ARAUJO, Hoss FIROOZNI, Mel HURD. Nevideble (ĉu malantaŭ la fotilo?): Ellen EDDY, Katalin KOVÁTS.



**ESPERANTO-PAROLANTO?**  
**PRUVU!**  
**TRAPASU**  
**LA NOVAN EKZAMENON**  
**DE UEA!**

(Venu al la programo ĉi-vespere por ekscii pri la ekzamenoj...)

## Poeziaĵo

Enspiras

La freŝa(n), marborda(n),  
kalifornia(n) aero(n)

Inspiras

— Ĝeremio

Helpu la redaktiston  
plenigi ĉi tiun malbelan,  
malplenan spacon!

**Kontribuu al la Fasko tuj!**

*Ne forgesu pri niaj lingvo-helpantoj: Ili volonte helpos vin pretigi viajn kontribuadojn por la Fasko. Serĉu ilin. Ili portas sur siaj nomŝildoj etajn ridetojn.*

